

# ŜAJNAS KE RUSOJ ŜATAS STALINON

Kiel vaste konate, sub la regado de Stalin la sovetiaj ŝtataj gvidantoj efektivigis grandskalan kaj unikan amasmurdon kontraŭ la propra popolo. Probable, la totalisma politiko de Stalin kostis ĉirkaŭ 20 milionojn da homaj vivoj. Malgraŭ tio, la populareco de la „gvidanto de ĉiuj popoloj“ daŭre kreskas en nuntempa Ruslando, kiu estas infektita de groteska reakcia naciisma ondo, kiu danĝere direktas sin ne nur kontraŭ certaj najbaroj (kiel Ukrainio, baltaj ŝtatoj) sed ankaŭ kontraŭ Usono, EU kaj la Okcidento.

Laŭ enketo de la Levada-centro ĉ. 45% de la rusoj opinias, ke la viktimoj sub Stalin „valoris la penon“ aŭ simile. En la jaro 2008 estis nur 27%, kiuj reprezentis tiun vidpunkton.

Laŭ la direktoro de la Levada-centro, Lev Gudkov, ĉi tiu rezulto respegulas rektan sekvon de la ŝtata propagando kaj regada maniero sub Putin, kiu kondukas akran reviziisman kaj nov-imperiisman kurson por rekolekti perditan terenon. Gudkov observas, ke sub tiuj cirkonstancoj kaj sub la kondiĉoj de kreskanta subpremado de la liberece kaj sendepende pensanta civila socio, en Ruslando kreskas la ŝtata kulto kaj kun ĝi ankaŭ la Stalin-kulto. La bazan ideon de la putinisma propagando li kvalifikas stalinisma.

Fakte, neniu posteulo de Stalin tute sukcesis malstalinismigi Sovetunion, inkluzive de Gorbaĉov kaj Jelcyn. Sistema malstalinismigo en Sovetunio kaj postkomunisma Ruslando do neniam okazis (ekzemple laŭ la maniero de la mal-NS-ismigo en Germanio post la 2a mm). Dum fine de la 1980aj jaroj nur 10% de la rusoj respektis Stalinon kiel grandan historian personecon, sub Putin en 2012 tiu procentaĵo kreskis al 50%. Depost kiam Putin transprenis la politikan povon en Ruslando okazis intenca rehabilitado (rehonorado) de Stalin kaj de la stalinismo, kiel Gudkov skribis antaŭ 3 jaroj.<sup>1</sup> Putin enkondukis sisteman programon por reedukadi la popolon en la nov-stalinisma senco. Al tiu strategio apartenas, ke en Ruslando oni hezitas kondamni la krimojn de Stalin. Laŭ la politologino Marija Lipman, la historia venko de Sovetunio en la dua mondmilito, kiu estas ligita kun meritoj de Stalin, estas la ĉefa kaŭzo kial en Ruslando oni hezitas klare kondamni la krimojn de Stalin kaj de la stalinistoj. Kritiki Stalinon signifus detrui la miton pri la historia venko de Sovetunio en la dua mondmilito.

Certe, Sovetunio faris grandegan kontribuon al la kontraŭbatalo kaj venko de la germanaj nacisocialistoj, sed Moskvo daŭre rifuzas agnoski, ke la liberigo de orienta Eŭropo samtempe signifis kruelan okupacion de la koncernaj landoj kontraŭ ties volo fare de la komunisma diktaturo, kiu estis gvidata kaj kontrolata en Moskvo. Ankaŭ tio okazis sub Stalin. Anstataŭ lanĉi novajn agresojn kaj minacojn kontraŭ tiuj landoj, estus pli bone kaj historie pli honeste, se la rusoj agnoskus sian kulpon kaj pardonpetus antaŭ la popoloj de orienta Eŭropo pri la krimoj, kiujn ili tie efektivigis. Sed la nacia orgojlo de la rusoj evidente ne permesas tian paŝon. Ŝajnas, ke en Ruslando oni forgesis la historian pakton inter Stalin kaj Hitler de 1939, kiam tiuj du diktatoroj ludis unikan kaj embarasan amikecon en la historio de tiuj du landoj kaj popoloj.

Aliflanke, okazis ankaŭ kontraŭdiraj signaloj: En 2007 Putin vizitis la pafejon en Butovo kaj parolis pri „tragedio“. Kaj en 2010 li omaĝis la viktimojn de Katyn, kie Stalin en 1940 ordonis pafi kelkmil polajn oficirojn. Sed tiuj signaloj estas kovritaj de aliaj decidoj, kiuj montras en la direkto de la rehonorado de la stalinismo. Precipe en lernejaraj libroj la krimoj de Stalin estas bagateligitaj kaj Stalin mem prezentita kiel kapabla moderniganto.<sup>2</sup>

Al la kripta glorado de Stalin kaj la stalinismo esence kontribuas la militaj paradoj okaze de la 9a de majo en Moskvo, kiuj sub Putin denove fariĝis pli pompaj de jaro al jaro, kiel dum sovetiaj tempoj, kun la laŭta prezentado de novaj instrumentoj de detruado. Ĉu temas nur pri blufado estas malfacile diri. Armiloj estas produktataj kaj prezentataj por apliki ilin en estonta milito. Post unu monato oni denove povos vidi tiun perversan milit-spektaklon, per kiu la „imperio de la malbono“, kies ŝtataj gvidantoj evidente suferas la malsanon de paranojo, celas demonstri sian militan potencon por impresi kaj timigi la mondon, precipe la Okcidenton.

<sup>1</sup> Vd. [http://carnegieendowment.org/files/stalin\\_puzzle.pdf](http://carnegieendowment.org/files/stalin_puzzle.pdf).

<sup>2</sup> Vd. ekz. <http://www.newizv.ru/lenta/2007-12-26/82319-odobren-uchebnik-istorii-stalin-vnov-vozhd-vseh-vremen-i-narodov.html>.

Sed la sinteno pri Stalin restas kontraŭdira ĉe la ruslandanoj: Antaŭ 3 jaroj 40% de la enketitoj konsideris Stalinon kiel „saĝan gvidanton“, dum samtempe 68% opiniis, ke li estis „kruela tirano“. Laŭ Lipman, tiu rezulto ne nepre signifas kontraŭdiron en la postsovetia psiko, en kiu „nacia grandeco estas ligita kun brutala perforto“.

Plej populara la pozitiva opinio pri Stalin kaj la stalinismo estas inter la malriĉaj, malkleraj kaj malbone informitaj tavoloj de la ruslanda popolo en la provinco de Ruslando, kiu esence formas la plimulton en tiu lando, dum Moskvo estas escepto. En Moskvo nur 13% de la enketitoj aprobis la starigon de Stalin-monumento okaze de 70a jariĝo post la venko en la dua mondmilito. En grandaj provincaj urboj la koncerna cifero estas 40%. Gudkov klarigas tiun abismon per la ekonomia strukturo kaj la aliro al informaj fontoj, kiu estas limigita en la izolita kamparo. Tie oni konsumas precipe la ŝtatan televidon,<sup>3</sup> kiu estas plenplena de propaganda histerio, agresemo kaj malamo kontraŭ Ukrainio, la baltaj landoj kaj la Okcidento. Multaj grandaj provincaj urboj de Ruslando daŭre estas karakterizataj de malnovaj sovetiaj strukturoj, kiuj neniam estis reformitaj, ekzemple tie ekzistas grandaj fabrikaj entreprenoj, kiuj produktas varojn por la milita industrio, kiu formas ĉefan ekonomian branĉon de Ruslando.

Tamen, ĉe la riĉuloj Stalin ne estas populara; nur 15% simpatias kun li. Ĉe homoj, kiuj perlaboras sufiĉan monon, tiu procentaĵo jam estas pli alta, nome 30%. Do, ankaŭ ĉi tie klare videblas groteska diferenco: la bonstata „meza tavolo“ principe rifuzas adopti la spiriton de la stalinismo, dum la reganta ŝtata elito – inter ili troviĝas multaj Putin-lojalaj oligarkoj – cinike klopodas revivigi ĝin laŭ plej diversaj metodoj – lastatempe ankaŭ per la minaco de la uzado de la nuklea bombo kontraŭ NATO kaj la Okcidento, kontraŭ Ukrainio kaj la baltaj ŝtatoj.<sup>4</sup>

Konkludo: En Ruslando la pritakso de Stalin estas kontraŭdira kaj varias laŭ unuopaj sociaj tavoloj, kiuj estas altgrade displititaj aŭ fragmentitaj laŭ ekonomia stato, klereco/informiteco kaj loĝado en Moskvo aŭ en la provinco. En Ruslando la homogena plimulta amaso de homoj estas malriĉaj, malkleraj, neinformitaj, dum nur relative malgranda procentaĵo (eble 10-15%) estas relative bonstata, klera kaj informita, do ‘moderna’, aŭ loĝas en la ĉefurbo. Tiom longe, ke Ruslando estas karakterizita de tia strukturo aŭ modelo, probable malmulto ŝanĝiĝos en pozitiva direkto en tiu lando, kiu baldaŭ komplete forsinkos en la malhelan naciisman abismon, kun fatalaj sekvoj por Ruslando kaj la mondo. Stabileco signifas en Ruslando unavice stagnadon. Certe, la Okcidento neniel kulpas pri la mizero de Ruslando – ĉi tiun veron oni ne povas sufiĉe ofte ripeti. Ruslando havas sufiĉe multe da naturaj resursoj, kiuj povus fari la popolon pli riĉa kaj prospera, sed la regantaj elitoj ne estas interesitaj pri tia evoluo kaj klopodas eviti ĝin, ĉar tiam ili perdus sian povon. La ĉefa problemo de Ruslando estas, ke ĝi estas centrisme regata de aŭtoritismaj aŭ diktatoraj oligarkiaj fortoj, kiuj ekspluatas kaj vendas la resursojn por mem fariĝi neimageble riĉaj. Dua problemo estas, ke la ruslanda socio restas apatia, letargia, pasiva, paralizita kaj fatalisme fidus al siaj regantoj, kiujn oni samtempe respektas, ĉar ili posedas la absolutan povon, kiun ili povas misuzi laŭplaĉe en lando kun arbitra jura sistemo, kiun ĉiuj homoj timas, kiuj vivas en Ruslando. Do, Ruslando esence funkcias laŭ tiu modelo. Kvankam la reganta elito estas krude kapitalisma kaj en si mem kontraŭ-komunisma, ĝi probable klopodos malhelpi vastan emancipiĝon de la popolo, subpremante ĉiajn eĉ nur plej malgrandajn simptomojn de opozicio, kritiko kaj kontraŭstaro, ĉar tio esence endanĝerigus la potencon kaj influon de tiuj regantoj. Oni do devas veni al la fina konkludo, ke la reganta elito cinike misuzas la spiriton de Stalin, kiu evidente ankoraŭ estas veka en la memoro de vastaj tavoloj kaj ludas ian rolon en la psiko de tiu popolo, kiu naive nostalgias pri iuj ‘gloraj’ tempoj (de Aleksandro IIIa,<sup>5</sup> Stalin, Breĵnev ktp.), kiujn oni neniam kritike analizis, kiel metodon por konservi sian politikan kaj ekonomiajn potencon kaj por efektiviĝi la kontrolon pri la lando. La popolo mem, kiu estas fatalisme kaptita de tiu perfida politiko kaj kredas la iluzion, ke ĝi estas bona, estas primensogita kaj trompita unu fojon pli en la historio de Ruslando kaj devas konstati, ke ĝi havas nenion por diri kaj restos senhelpa. La sola taŭga karto, kiun tiu kompatinda popolo povas ludi, estas oportunisme apogi la putinisman politikon de la subpremado, agresado, milito kaj malpaco, kun la drasta iluzio, ke tio estas la ĝusta, vera kaj sola vojo de Ruslando, kiu

<sup>3</sup> Fifamaj estas la televidaj elsendoj de Kiseljov, Mamontov kaj Solovjov sed ankaŭ la centra novaj-elsendo Vesti, kie elpaŝas ĉiam la samaj kriaj demagogoj, dum kritiko pri Putin kaj la politika situacio en Ruslando komplete mankas.

<sup>4</sup> La plej nova gazetara komunikado ĉi-rilate estas trovebla sub <http://www.bild.de/politik/ausland/krim/times-berichtet-putin-droht-westen-wegen-baltikum-mit-atomwaffen-40397478.bild.html>.

<sup>5</sup> En la plej nova numero de la ekonomia revuo Ekspert aperis artikolo, kiu senbride gloras la meritojn de tiu caro. Mi ree kaptos la okazon por verki detalan analizon pri tiu caro kaj lia tempo, kiu estas grava, ĉar temas pri la aperotempo de Esperanto.

ŝajne travivas iun nacian renaskiĝon per ege dubindaj metodoj. En eventuala estonta milito, la sama popolo, kiu elektis tiujn politikistojn, probable servos al ili ankaŭ kiel 'kanona nutraĵo'. Ĉi tiu politiko estas danĝera ne nur pro tio, ke ĝi direktas sin kontraŭ la eksteraj „malamikoj“ de Ruslando, kiuj estas memimagitaj, sed ankaŭ kontraŭ la ruslanda popolo aŭ socio mem.

Okaze de la 70a datreveno de la „Tago de la Venko“ Stalin reviviĝas en la tuta lando en formo de novaj munumentoj, kiuj estas starigitaj aŭ starigotaj je la honoro al la sovetia diktatoro. En la fororienta urbo Ussurijsk, kiu situas 60 kilometrojn de la ĉina limo, sur la muro de iu komerca centro estis aldonita memortabulo. Dum la inaŭguro okazis festceremonio kaj koncerto. Kvankam Stalin mem neniam vizitis ĉi tiun urbon. En la regionoj de Lipeck, Vladimir, Saratov kaj Jakutio oni planas starigi aliajn monumentojn. En februaro en Jalta estis inaŭgurita alia monumento, kiu montras Stalinon kune kun Churchill kaj Roosevelt. Ankaŭ en la Olimpia Urbo Soĉi oni planas inaŭguri iun Stalin-monumenton, same en la urboj Orjol kaj Krasnojarsk. En Moskvo, Peterburo kaj Niĵni Novgorod homoj postulis, ke stratoj portu la nomon de Stalin. Kvankam Putin evitas eksplicite mencii Stalinon, ekzistas nenia dubo, ke tiuj iniciatoj ĝuas la bonvolon kaj subtenon de la ruslanda prezidento. Sub Putin la bildo de Stalin estis beligita en la oficialaj lernejoj libroj. Ankaŭ aliaj altrangaj politikistoj kiel Boris Gryslov pozitive parolis pri Stalin. Samtempe kun la intenco starigi monumentojn kaj memortabulojn honore al Stalin, la politikaj instancoj en Ruslando batalas kontraŭ ĉiuj provoj konservi la memoron pri la gulago kaj la stalinisma teroro. La plej sensacia kazo kadre de tiuj klopodoj estis la transpreno de la sola gulag-muzeo en la lando, „Perm-36“, fare de la ŝtato. En ĉi tiu muzeo, kiu estis deklarita kiel instalaĵo de „eksterlanda agento“ estas intencite forigi la memoron pri la ruĝa teroro okazinta en Sovetunio en la 30-50aj jaroj.

Fontoj:

<http://www.levada.ru/31-03-2015/stalin-i-ego-rol-v-istorii-strany>

<http://www.nzz.ch/international/stalins-erneuter-fruehling-1.18515456>

[http://www.focus.de/politik/ausland/diktatoren-renaissance-stalin-denkmaeler-hoch-im-kurs-russland-huldigt-einem-massenmoerder\\_id\\_4653374.html](http://www.focus.de/politik/ausland/diktatoren-renaissance-stalin-denkmaeler-hoch-im-kurs-russland-huldigt-einem-massenmoerder_id_4653374.html)

© Andreas Künzli, [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch), 2 aprilo 2015, 2 majo 2015